



Esperanto-Informilo



Foto: A. Deutsch. la 30-an de oktobro. Kvin Funelofungoj "Monaĥkapoj" (lat. Clitocybe geotropa) en ĉeriza arbareto (Kirschenwäldchen) apud Wetzlar.

Mesaĝo de la prezidanto:

Mi ĵus finlegis la distopian romanon "Hundoj de Eŭropo" de la belarusia aŭtoro Alhierd Bachareviĉ, kiu poste inspirigis min verki malgrandan eseon pri la estonteco de libroservoj, librovendejoj, gazetvendistejoj - kiuj eble jam baldaŭ unu post la alia devos rezigni pro manko de aĉetantoj. Ĉiuokaze, la nura bona afero estos ke neniu ŝtato aŭ nacio kapablos bruligi librojn kiuj ne plu estos presitaj. Aŭ, kiel ĵus memfarita proverbo mallonge diras:

"Libro ne presota ne povos esti bruligota"

G. Hennemann, 3-an de novembro 2025

Novembro
2025

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Esperantaĵo
- Lasta paĝo

Kolofono:
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.

c/o Georg Hennemann
Rehgartenstrasse 16
35683 Dillenburg
Tel.: 02771 8196614

Bankverbindung / bankkonto:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: BE92 9051 1007 7223
BIC: TRWIBEB1XXX
bei: Wise, Belgien

Jahresbeitrag / jarkotizo:

ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Unua mardo

La 4-an de novembro 2025
ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zomo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Dua mardo

La 11-an de novembro 2025
ekde la 19-a horo: Interna babilado per Zomo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Tria mardo

Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 18. November, 2025 --- Mardo, la 18-an de novembro, 2025

18:30 h

Sprachrunde

Lingva Rondo

“La lingvo Balbuta”

G. Hennemann

19:30 h

Vortrag

Prelego

“Moderna bestotrejnado”

A. Stecay

Mardo, la 25-an de novembro, 7pm

ekde la 19-a horo: „Senprograma samideana babila renkontiĝo“
Stattcafé, Gremppstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm en Frankfurt je Majno

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745>,

https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg

Anoncoj:

- „Esperanto kurso A1.2 – hybrid“
por partoprenantoj kun iom da antaŭa scio, ekde la 1-a de novembro
<https://www.vhs-hochtaunus.de/programm/sprachen.html?action%5B147%5D=course&courseId=486-C-F611-008&rowIndex=0>
- 29.11.25 Propono: Je la 15 horo vizito de karikatura muzeo kun la speciala ekspozicio „Nur Perscheid povas fari tion“ pri la karikaturisto kaj tekstverkisto Martin Perscheid (* 16-a de februaro 1966 en Wesseling; † 31-a de julio 2021 samloke) ekde la 16-a horo. Pro lasta sabato de monato kun senpaga eniro atendu homvicon antaŭ la muzeo.
- 14.12.25 Okaze de la Zamenhof-Tago ni renkontiĝos je la 12-a horo sur la Wiesenhüttenplatz en Frankfurto por kanti la esperon kaj reciti el la Fundamento. Kaj poste renkontiĝos en apuda japana restoracio Moŝ-Moŝ.
- 16.12.25 Dum nia lasta renkontiĝo en Saalbau MÜZ ni havas la okazon ĝui prelegon de Ulrich Matthias pri siaj vojaĝoj al Madagasio.



elstara foto: Ĉielo, sendita de U. Fellmann la 12-an de oktobro, 19:02 CEST. “Ĝus fotite antaŭ dek minutoj. Jam du minutojn poste, la tuta ruĝo estis malaperinta.”

Pensoj pri la estonteco de libroj, gazetoj kaj librovendejoj

De Georg Hennemann

La konata *taz* gazeto (taz estas la mallongigo por *taga gazeto* (germane: Tageszeitung) ekde nun aperos nur plu ciferece: La lasta presita taga eldono aperis vendredo, la 17-an de oktobro 2025. Ĉu ni devus esti ŝokita aŭ nur miri pri tiu fakto? La *taz* ĉiam faris multajn aferojn alimaniere ol la aliaj gazetoj, sed certe estas grava paŝo konsternigi 14-mil da abonantoj kaj aliaj presitaj amaskomunikiloj eble baldaŭ sekvos la ekzemplon. La aliaj eldonistoj, kaj ankaŭ la Federacia Asocio de ciferecaj eldonistoj kaj gazeteldonistoj (BDZV), atente observas kion *taz* faras kaj ĉu la modelo funkcias: Ĉar la ĉiutaga gazetkomerco estas en krizo. La *taz* daŭrigas oferti kombinitan modelon de cifereca kaj semajna gazeto: Ĉe *taz*, ĉi tiu senpaga reta aliro por ĉiuj estas tradicio jam de jaroj. Historie, la "kolegoj" vidas sin kiel komunumon de solidareco. Kaj *taz* ne tute forlasis presitan gazetaran eldonaĵon. Dum semajnfinoj, oni ankoraŭ povas teni la semajnan *taz* en la manoj kiel kutime. "Ĉi tiu kombinita modelo de cifereca, konstanta aliro, kaj liverado de granda semajna eldono kun profunda analizo certe estos sukcesa modelo en la venontaj jaroj," kredas ĵurnalista profesoro Meier. Li vidas renesancon de la semajna gazeto. Almenaŭ nuntempe, li ne antaŭvidas la forpason de gazetoj. Sed poste, papero fariĝos malaktuala. La sekva ŝanĝo jam estas antaŭvidebla: Al (Artefarita Intelekt) denove transformos la informan merkaton. Kaj ankaŭ libroj kaj librovendejoj sentos la efikojn ke papero fariĝos pli kaj pli malaktuala. Se la legantoj uzas e-librolegilojn konektitaj al la reto, eldonistoj ne plu riskos presi grandajn eldonkvantojn surpapere. En sia romano „Hundoj de Eŭropo“ la aŭtoro Alhierd Bachareviĉ desegnas distopian bildon de Eŭropo el la jaro 2049, en kiu la protagonisto vizitas la lastajn librovendejojn en Hamburgo, Parizo kaj Prago por malkovri la identecon de iu stranga poeto, kiu verkis en iu nekonata lingvo. Poste li ektrovis ke la lingvo

estis nomata „Balbuta“ kaj ke ĝi estis inventita en la iama Belarusio ... verŝajne kiel ilo por fuĝi el tiama fia socialista realeco en iu pli dezirinda mirlando. Je la fino de la romano eĉ estas alkruciĝita malgranda gramatiko kaj vortaro de la lingvo balbuta, ĉar ene de la romano troviĝas kelkaj alineoj, kiujn la aŭtoro nur citas el tio lingvo sen ilin traduki. Sed la plej konfuza kaj ekscita punkto en la romano estas la fakto, ke aŭtoroj kaj precipe poetoj en tiu estonta tempo ne plu estos estimataj – kontraŭe en tiuj lastaj librovendejoj ili serĉas rifuĝejojn kaj prezentas siajn verkojn sub la hipokrita intereso de grupo de junuloj, por kiuj la poemarprezentado estas pura amuzaĵo kaj ilia ĉefa celo estas moki la poetojn.

Finfine mirinda fakto: Eĉ Esperanto kaj aliaj konstruitaj lingvoj estas menciita en la romano de A. Bachareviĉ. Ekzemple je la paĝo 19 de la germana traduko: „Mi jam timas, ke mi devos doni al li prelegon pri Esperanto kaj aliaj konlingvoj, diri al li, ke mi ne estas la sola perversulo en la mondo interesata pri artlingvoj. Kaj hazarde menci, ke la termino 'artlingvo' ne estas terminologie ĝusta en ĉi tiu kazo; ĝi devus esti 'konstruita lingvo'. Artefaro estas stato de morto, iluzio.“

Aŭ sur paĝoj 34 kaj 35: „Ĉiu konlingvo devas plenumi kvin gravajn postulojn. ... Tiel, ĉiu nove kreita lingvo devas kombini en si la eŭfonion kaj liberecon de Esperanto kun la racio kaj konscio de Toki Pona, la komencanta frenezo de slavaj dialektoj, kaj la ambigueco de la malproksim-orientaj skriboj...“.

Mi ne scias kial la aŭtoro elektis kiel titolon „La hundoj de Eŭropo“ por sia romano, ĉar ne tute certas kial la protagonisto ĉiam pli ofte aŭdas bojadon – plej verŝajne la „bojado“ venas de kreskanta grupo de homoj kiuj ne plu ŝatas poetojn kaj ilian poezion kaj per sia sajnigita bojado volas moki kaj forpeli tiujn lastajn poetojn.

<https://www.tagesschau.de/inland/gesellschaft/zeitung-digital-taz-100.html>

<https://www.deutschlandfunkkultur.de/rezension-alhierd-bacharevic-hunde-europas-100.html>

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

Kliento je la kaso:

- Se vi ankoraŭ neniam vidis monbileton de 70.-€, kiel vi povas aserti, ke tio-ĉi estas falsa?

Proverbo de la monato (elektita de G. Hennemann)

Hodiaŭ mi prezentas proverbon kiu temas pri minacoj kaj
„Ne timu hundon bojantan, timu hundon silentan“

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_001748.htm

Rubriko: Enigmo - solvo de la enigmo el la lasta ei

De Felmano Ulriko

La enigmo tekstis tiel: "Temas pri historirilata demando. Antaŭnelonge, hispana Esperantisto el la urbo Alteo raportis pri loka festo nomita "Maŭroj kaj Kristanoj" (https://es.wikipedia.org/wiki/Moros_y_cristianos). En Alteo oni festas la venkon de kristanoj super la nordafrikaj islamanoj, kiuj ja dum kelkaj jarcentoj regis en la Ibera duoninsulo. La menciita hispaba Esoerantisto montris videon pri tiu festo, en kiu oni povas spekti kiel multaj kostumitaj personoj sur la strato per malnovstilaj pafiloj multe pafas kaj ludas la konkeron de la Maŭra vilaĝo fare de la kristanoj. Ili tiom multe pafas, ke la aero estas plene da fumo.

Nun la demando: Kio en tiu festo kajaŭ rakonto estas neebla malĝustaĵo?"

Respondis tiam Gundhild kaj Reinhard.

Gundhild skribis: "*mi pensas, ke verŝajne la originaj pafistoj ne pafis en la aeron*", kio duone veras, ĉar tiam pulvaj pistoloj kaj pafiloj manportebaj ĝenerale en Eŭropo ankoraŭ ne ekzistis, do ili ne nur ne pafis en la aeron, sed tute ne pafis per io kio povus krei fumon en la aero.

Reinhard trafis la solvon komplete per tiu respondo: "*Pri la enigmo en El: La respondo estis jam verŝajna laŭ la priskribo, kaj Vikipedio konfirmas ĝin: Kvankam pulvo estas konata en Eŭropo jam pli longe ol mi pensis, en la 1230aj jaroj, kiam okazis la bataloj, ĝi ne estis konata aŭ maksimume onidire. Pulvajn armilojn oni konstruis nur ekde la sekva jarcento.*"

Ĉu vana laboro?

De Felmano Ulriko

En 1994 mi laboris por financa instituto en Frankfurt. Tie mi verkis programon por financaj datenoj. Ĉar mi pri tiu fako nenion sciis, mi legis libron pri ĝi kaj kreis por mi tabelan liston de financaj fakvortoj, en la du lingvoj, angla kaj germana.

Iam mi havis la ideon traduki tiujn al Esperanto. Post ioma serĉado, mi trovis plurajn listojn, libretojn kaj librojn pri tiu temo.

La plej ampleksa ĝenerala ekonomia fakvortaro estis 11-lingva kaj enhavis ĉ. 2800 kapvortojn. Ĝi helpis traduki la plej multajn vortojn, kiuj estis sufiĉe bazaj. La plej multajn oni ankaŭ trovis en ĝeneralaj dulingvaj vortaroj, en Krause por DE-EO, kaj en Benson kaj Wells por EN-EO.

En 1995 mi eklaboris je granda banko en speciala fako pri financado de grandaj projektoj. Tie kreigis multaj specialaj fakvortoj rilate financjuraj specialaĵoj. Neniu de tiuj troviĝis en la menciita plej dika vortaro, nek en tiuj pli specialaj aliaj. Mi provis krei mem la bezonatajn terminojn.

Mi uzis tiun materialon por fari prelegon pri tio dum la jarkunveno de la Gesellschaft für Interlinguistik en Berlino. Jaron poste, mi laboris en la banka sekcio pri komputado de financerivaĵoj, tre komplikaj produktaĵoj en tiam rapide kreskanta merkato. Denove, komplete mankis ties fakvortoj en la menciitaj vortaroj. Tiam mi komencis mem verki trilingvan fakvortaron pri tiuj financaj derivaĵoj.

Poste mi faris grandan eraron: Anstataŭ publikigi miajn novkreitajn terminojn el la kampo de financaj derivaĵoj, mi decidis plivastigi mian teman kampon, unuaŝtupe al negoceblaj valorpapiroj ĝenerale, triaŝtupe al la tuta kampo de ekonomio. Mi opiniis, ke mi finos ĝin post unu jaro. En la jaro 2000 mi taksis ke mi bezonos pliajn kvin jarojn. 2010 mi decidis ĉesi flegi ĝin. Tiam mi havis pli ol 50'000 kapvortojn (kun difinoj kaj fontindikoj), kaj mi taksis, ke por finpretigi ĝin mi bezonos pliajn dek

jarojn. Sed tiu laboro blokis tro da aliaj projektoj, pro tio mi "kabeis" rilate la fakvortaro. Ĝisnune, la plej ampleksa ekonomia fakvortaro aĉetebla en Esperantujo estas ankoraŭ tiu jam menciita 11-lingva, kiu enhavas ĉ. 2800 kapvortojn, kaj ĝi estas de 1990. La fakvortoj mem estas la samaj kiel en la 9-lingva versio de 1974, oni nur aldonis du pliajn lingvojn (JP kaj ZH). Nacilingvaj ekonomirilataj ĝeneralaj paperaj fakvortaroj havas kutime inter 100'000 kaj 250'000 kapvortojn.

Antaŭnelonge, Esperantoamiko en iu Telegrama grupo demandis min:

"Ĉu vi volas publikigi iam tiun parton de la laboro kiu estas jam finita, eĉ se la resto neniam aperos?"

Kaj mi respondis:

"Ne estas tiel, ke la menciitaj 50'000 kapvortoj estas perfektaj (kun tradukoj al du lingvoj, fontindikoj, uzoekzemploj, referencoj al aliaj kapvortoj) kaj pliaj 30'000 estas ne pretaj. Estas tiel, ke la 50'000 estas en malsamaj perfektogradoj kaj bezonas finan kontroladon, kio ankaŭ jam postulas multe da tempo. Krome, mia celo estis prezenti ankaŭ la plej novajn terminojn, ĉar kreiĝas daŭre novaj. Nun la enhavo estas jam 15 jarojn aĝa, mankas do multe."

Konklude, mi ja investis multe da tempo, kaj neniam aperis la ampleksa verko. Ĉu do ĉio estis vana penado? Nu, unue, la verkado de tiu fakvortarega ruino ĝojigis kaj instruis min.

Menciindas, ke mi lernis multe pri komerco, multe pri tradukado, multe pri vortfarado, kaj multe pri leksikologio. Due, iom da utilo ja kreiĝis ankaŭ por Esperantujo: fruktoj el mia laboro estas du Vikipedioartikoloj, unu titolanta Derivaĵo (ekonomio), alia Tobin-imposto. Certe, tio ne multas. Kiel oni diras...

"La monto eknaskis, kaj fine naskis muson."

La lingva angulo

De Felmano Ulriko

Ĉu vi sciis...

ke la vorto ekspliki estas neologismo por la Fundamentbaza vorto klarigi, kiu baziĝas sur la radikoj klar' kaj ig? Zamenhof uzis tiun vorton tre ofte, kaj en la originala verkaro, kaj en la lingvaj respondoj, kaj en la tradukoj (oftege ekz-e en Hamleto), kaj tre ofte en liaj leteroj.

La vorto ekspliki estis nur poste kreata fare de iuloj, kaj ĝi estis neniam agnoskata de la Akademio de Esperanto.

Unu ekzempla citaĵo el la leteroj de Zamĉjo:

"por ke nia laborado estu fruktoporta, ni devas antaŭ ĉio bone klarigi al ni la internan ideon de la esperantismo."

Konkludo: oni tre ofte povas krei bezonatan sencon el Fundamentaj radikoj, anstataŭ uzi novan radikon kiu kreiĝis speciale por nur tiu unu senco.

Atentigo kajaŭ memorigo pri okazoj:

De la 4-a ĝis 7-a de decembro okazos la
6-A VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO.

Oni povas aliĝi per

<https://vk.esperanto.net/2025/aligxilo/>

Ĝis marto 2026, oni povas partopreni en la 77-a okazigo de la Beletraj Konkursoj de UEA. Limdato por ricevo de via kontribuo estos la 31-a de marto 2026.

Ligilon oni trovas i.a. je La Ondo de Esperanto: <https://sezonoj.ru/2025/10/gk-298/>

TEJO informas pri la EU-a Erasmus-programo "Esperanto as an interdisciplinary field of transnational innovation". Legu pli je:



<https://www.tejo.org/lernu-pri-esperanto-ricevu-6-ects/>

Jubilee: <https://www.liberafolio.org/2025/10/07/brajla-skribo-jubileas-kaj-evoluas/>

Libera Folio (<https://www.liberafolio.org/2025/10/07/brajla-skribo-jubileas-kaj-evoluas/>)

Brajla skribo jubileas kaj evoluas

En la jaro 2025 oni festas la 200-jariĝon de brajlo, skribsistemo inventita por blinduloj en 1825 de la tiam 16-jara franco Louis Braille. Versio de brajlo kun esperantaj literoj estis proponita de...



A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H	Ĥ	I	J	Ĵ
K	L	M	N	O	P	R	S	Ŝ	T	U	Ŭ	V	Z

Esperanta Brajla Alfabeto

Lasta paĝo

Traduko de poemfragmento en la komenco de la romano “La hundoj de Eŭropo”,
Poemo de W. H. Auden (1907-1973) en rememoro al W.B. Yeats.

de G. Hennemann

Originalo

III

...

In the nightmare of the dark
All the dogs of Europe bark,
And the living nations wait,
Each sequestered in its hate;

Intellectual disgrace
Stares from every human face,
And the seas of pity lie
Locked and frozen in each eye.

Follow, poet, follow right
To the bottom of the night, ...

Traduko

III

...

En la koŝmaro de l' mallumo
Ĉiuj hundoj de Eŭropo bojas,
Kaj la vivantaj nacioj atendas,
Ĉiuj izolitaj en sia malam`;

Intelektala malhonoro
Glimas de ĉiu homvizaĝ`,
Kaj maroj de kompato kuŝas
Ŝlositaj kaj frostigitaj en ĉiu okulo.

Sekvu, poeto, sekvu ĝuste
ĝis la fundo de la nokto, ...

<https://poets.org/poem/memory-w-b-yeats>

<https://chatgpt.com/g/g-6ed4kHvjw-poetry-translator/c/6905ea5c-80cc-8325-bdaf-7cef7505590d>

